11-a JARO, N-o 429 MONATA ESPERANTO-GAZETO 25. MAJO 1935

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO : 67, avenue Gambetta, Paris 20e
Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris : Bruxelles n-o 350 189, S'Gravenhage n-o 211 533, Kopenhago n-o 4 986, Paris n-o 1234 22. Stokholmo n-o 74 153, Wien n-o D-109 068, Zagreb n-o 41 448, Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT. bonvalutaj devizoj en rekom. letero aŭ bankĉeko je nomo de « Bannier ».

## FRAKCIA AŬ FAKA LABORO EN SAT ?

La signoj pri kreskanta unuecema laboro en la laborista esperantista movado plimultiĝas k vekas esperon en la koroj de multaj K-doj, kiuj kun profunda ĉagreno travivis la malbrilan epokon de nia movado. La simpla vero, ke la forto de la laboristaro troviĝas en ĝia unueco, eknestas en pligrandiĝanta nombro da lab. esperantistoj k espereble efikos kiel instigilo por la estonta evoluo de la lab. esperantismo.

Por forigi kiel eble plej komplete ĉiujn obstaklojn, kiuj povus bari la vojon al tiu ĉi kreskanta unuecemo, ni devas esplori, ĉu ne ekzistas organizaj rimedoj favorantaj tiun ĉi procezon, eĉ akcelantaj ĝin. Ĉar SAT por ĉiam devas resti la tegmento, sub kiu frate k man-en-mane la K-doj de *ĉiuj* klasbatalaj tendencoj laboru por la celo speciale elektita de nia Asocio, tial la *lukto de tendencoj* en la kutima formo, kia ĝi sin montris dum longaj jaroj, ne povas trovi lokon en ĝi. Tamen ekzistas en la Asocio konstantaj krizaj centroj,kiuj daŭre minacos superbordiĝi k provoki novajn skuojn, se ni ne ĝustatempe starigos digon firman k sufiĉe altan. Tiuj ĉi krizaj centroj estas la politikaj *Frakcioj*.

SAT estas verŝajne la sola organizo, kiu permesas en sia kadro la ekziston de politikaj frakcioj. La permeso de tiaj frakcioj estis inspirita de la ideo, ke ili *esperantigu* siajn partiojn, sed neniel la fondintoj de SAT celis liberigi la vojon al politikaj frakcioj por fari *politikan* laboron en la Asocio. Se tiel estus, la Asocio fariĝus ĥaosa batalejo, el kiu amase fuĝus la membraro postlasanta nur etan aron da fanatike interpugnantaj partiuloj.

La sperto montris, ke la tasko atribuita al la frakcioj dekomence fakte ne estis plenumita, sed male, la frakcia laboro koncentriĝis, kiel estis nature, al la klopodoj « konkeri » la Asocion por servigi ĝin ekskluzive al la propra partio. La « Historio pri la Skismo », ĵus eldonita de SAT, montras kun granda evidento la danĝeran rolon de frakcioj k devas instigi la fidelajn SAT-anojn al eksterordinara singardemo k atento. Tiom longe, kiom la tolerema k objektivema spirito ne konkeris la respondecajn kapojn de la frakcioj, ni devas kalkuli kun la tre verŝajna evoluo, ke politika frakcio, superanta laŭnombre aliajn aŭ akirinta relative grandan forton, klopodos submeti la Asocion sub la partian diktaturon k tiel kaŭzos novan skismon kun ĉiuj ĝiaj malbonaj, eĉ katastrofaj sekvoj.

Neniel mi celas tie ĉi kondamni politikan partion, kiun mi eĉ konsideras necesa k nepra por la emancipa lukto de la proleta klaso. Sed oni devas distingi la politikan laboron de tiu, kiun difinas al SAT-ano la Asocia Statuto. Neniu estas devigita aliĝi al SAT, sed oni devas postuli, ke tiu, kiu aliĝas, agnosku k sekvu la Statuton. La partiano, kiu estas laŭkonscie pli progresinta ol senpartiulo — ĉar li ekkonis jam la neceson de organizita batalo —, povas sen partia propagando pligrandigi la influon de sia partio per modela laboro en la senco de la SAT-Statuto, per klara ekspono de siaj ideoj k per lojala k tolerema sinteno.

Dum la *frakcia* laboro portas en si ĝermon de disigo, la *faka* laboro tendencas al unuigo. En la faka laboro povas renkontiĝi diverstendencaj K-doj, k la diversaj fakoj inter si ne kontraŭas, sed eĉ ofte kompletigas unu la alian. Tiuj fakoj, kiujn oni povas nomi ankaŭ *Sekcioj*, krom tio favorigas multe pli la utiligon de esperanto k ĝian propagandon. En SAT jam ekzistis, en la prospera tempo, granda faka vivo : funkciis pedagogia, kooperativa, junulara, sporta, studenta, vegetara, liberpensula sekcioj, inter kiuj kelkaj regule aperigis fak-paĝojn en « S-ulo ». Estas apenaŭ necese aparte montri al la granda utilo de tia faka laboro. En la kadro de l' fakoj mem kunlaboras harmonie diverstendencaj K-doj. Komunaj specialaj interesoj interligas tiujn, kiuj sur idea kampo, pri teoriaj problemoj, furioze interbatalas k ne trovas la unuigan formulon. Sed facile k kun paco ili kunlaboras sur praktika kampo. Certe, ankaŭ dum tiu ĉi laboro ekaperas teoriaj problemoj, kiuj kaŭzas diskuton aŭ eĉ disputon, sed tamen, ĉar la objekto estas difinita k limigita, tial la interkonsento estas pli facila.

Se iel la organiza unueco de la laborista esperantistaro estas ebla, tiam nur sur la bazo de praktika laboro, kiu servas al ĉiuj sektoroj de la laborista klaso k el kiu ankaŭ la partioj profitus. Konsekvence, la frakcia movado devas rangiĝi post la faka k ricevi tian konstitucion, kiu atribuas al ĝi difinitajn taskojn, akordeblaj kun la Statuto de SAT k malebligantaj la danĝeran devojiĝon, pri kiu mi parolis.

Se SAT tiel estos sekurita kontraŭ ĉiuj surprizoj k havos antaŭ si agadkampon, sur kiu ĉiu SAT-ano trovos sian angulon por okupiĝi pri la kontentigo de interesoj precipe por li karaj, tiam pli rapide kreskos la fido al nia Asocio k ĝi realtiros la grandan nombron da tiuj K-doj, kiuj kun bona volo k kun entuziasmo iam sindone kunlaboris, sed ĉagrene nin forlasis, kiam la partiaj pasioj furiozis tra niaj vicoj.

*H. P.*

*En la maja kajero de*

**SENNACIECA REVUO**

**ilustrita monata eldonaĵo de SAT (16 paĝ.)**

oni legas i.a. konsiderojn okaze de la Unua de Majo, skizojn pri aktualajoj de Usono, Islando, Holando, Britio, ktp, kc. — Ampleksa literatura parto, — Arto k Scienco. — Literaturkritiko.

Prezo de la kajero : **2.25** fr. fr.
Jarabono sur la bazo de **25** fr. fr.

**SAT,** *67, avenue Gambetta*
*PARIS 20.*

# XV-a KONGRESO DE SAT EN PARIZO

## 3.-7. aŭgusto 1935

**Adreso: SAT, 67, avenue Gambetta, Paris 20**

5. *Komuniko.*

Afiŝo. Ni ĵus eldonis simplan, dukoloran afiŝon kun okulfrapa alvoka teksto. Ni fiksis tute malaltan prezon, nome 0.30 fr. fr. (= 0.03 hol. gd.) por la ekzemplero. Sekretarioj de grupoj, sekcioj, rondoj, havigu al vi senprokraste almenaŭ unu ekzempleron por la elpendigo en via ejo !

Restoracioj. La prezoj en la Parizaj restoracioj varias laŭ la monujo de la klientaro. Tamen ankaŭ en la simplaj restoracioj la manĝaĵoj estas bonkvalitaj. La prezo en simpla restoracio varias por manĝo inter 5-8 fr. fr. (trinkmono ĝenerale deviga, escepte de kelkaj vegetaraj manĝejoj : 10%). Listo de rekomendindaj restoracioj (vegetaraj k aliaj) aperos en la *Programlibro*, kiun ricevos la kongresanoj. Parto de la Gek-doj verŝajne povos komunmanĝi apud la Kongresejo por maks. 5.— fr.

Artaĵoj. La OKK klopodas aranĝi la artan k distran flankon de la kongres-programo laŭeble per la propraj rimedoj, kiuj troviĝas je nia dispono (kantrondo, ktp).

Trafikiloj. Atentu la aparte presitan artikolon pri tiu afero !

Aliĝu ! Ni refoje vokas al vi ĉiuj, Gek-doj en la tuta mondo ! Aliĝu multnombre la XV-an Kongreson ; ne hezitu pli longe ! Niaj aliĝlistoj montras ankoraŭ tre malmultajn nomojn el eksterfranciaj regionoj. La kongresdato rapide alproksimiĝas. Kaj por ĉiuj niaj aranĝoj ni bezonas scii, kiom proksimume da Gek-doj ni povos atendi la 3-an de aŭgusto en Parizo ! Do, sendu tuj vian aliĝon !

*O. K. K.*

2. *Listo de kongres-aliĝintoj.*

21. K-do Capoulade, Sète, Francio ; 22. Eug.-Robert, Le Raincy, Francio ; 23. K-dino Favreau, Le Raincy, Francio ; 24. E. Lanti, Paris ; 25. R. Laval, Champigny, Francio ; 26. A. J. Bienefelt, Delft, Nederl. ; 27. Jean Bernard, Bousbecque, Francio ; 28. k 29. A. k M. Veen, Amsterdam ; 30. Marcel Roux, Charbonnières-les-Bains, Francio ; 31. Daniel Pons, Mostaganem, Alĝerio ; 32. Belaud, St.-Nazaire, Francio ; 33. P. G. v. d. Plank, Dordrecht, Nederl. ; 34. T. Goudbeek, Zwolle, Nederl. ; 35. A. Cuny, Malakoff, Francio ; 36. H. Cachon, Eaubonne, Francio ; 37. Anton Francisko, Valencio, Hisp. ; 38. Jos. Féron, Fécamp, Francio ; 39. K-dino M. v. Essen, Marken Binnen, Nederl. ; 40. P. Cugny, Dijon, Francio ; 41. E. Barbezat, Peseux, Svisio ; 42. E. Barrow, Paris ; 43. Göte Klasson, Langshyttan, Svedio ; 44. Arleto Piŝon, Paris ; 45. L.G. Avid, Paris ; 46. Jac. Preker, Amsterdam, Ned. ; 47. Jan Van 't Hof, Amsterdam ; 48. Suzanne Collignon, Rebais, Francio ; 49. A. Pâris, Malakoff, Francio ; 50. K-dino E. Moon, Ilford, Anglio ; 51. E. Sugar, Manchester, Anglio ; 52. J. Sulsky, Luton, Anglio ; 53. Fritz Johansson, Höganäs, Svedio ; 54. K-dino Larguier, Le Masdeval, Francio ; 55. E. Jonsson, Langshyttan, Svedio ; 56. Rod. Dasen, Genève, Svisio.

# PROPONOJ AL LA XV-a KONGRESO

1. La 15-a Kongreso de SAT, konstatante, ke SAT, laŭ sia statuto k laŭ pluraj kongresdecidoj, celas esti organizo de ĉiuj klasbatalaj tendencoj, opiniante, ke la nuna tutmonda situacio pli ol iam necesigas la konservon de ĉi tiu starpunkto, deklaras, ke ĝi restas fidela al ĉi tiu sia dekomenca fundamenta gvidprincipo, konfirmas la en la 3-a SAT-kongreso eldiritan malaprobon pri enŝovado de disputpunktoj, kiuj disigas la diversajn klasbatalajn organizojn, komisias al la Plenum-Komitato severe obei nomitan gvidprincipon k zorgi, ke la redaktado de la SAT-organoj okazu konforme al tiu principo.

*G.P. de Bruin (SAT-ano 670).*

2. La 15-a Kongreso de SAT, konstatante, ke necesas fiksi la taskojn k rajtojn de la frakcioj, *deklaras*, ke la ĉefaj taskoj de la frakcioj estas : 1) la utiligo de esperanto pere de la SAT-aparato en la servo de la tendenco, kiun ĝi reprezentas ; 2) la propagando por esperanto en la partio, organizo aŭ movado de ĝia propra tendenco ; — ke la frakcioj rajtas presigi siajn oficialajn, organizajn komunikojn en « Sennaciulo », kondiĉe, ke ili ne estu ampleksaj k ne enhavu atakojn aŭ ofendojn al aliaj klasbatalaj tendencoj ; — ke cetere la membroj de la frakcioj, kiel ĉiu SAT-ano, rajtas esprimi siajn ideojn en la diskuta rubriko de « Sennaciulo », kondiĉe ke tio okazu laŭ maniero neataka k neofenda al aliaj tendencoj, — k *akcentas*, ke SAT neniel respondecas pri la agado de la frakcioj.

*G. P. de Bruin (SAT-ano 670).*

*Komentoj de la proponinto :* Mi opinias, ke SAT por esti vivkapabla k por servi al la interesoj de la tutmonda proletaro, devas resti ĉiutendenca. Se ĝi ne estos tia, ĝi iĝos sekto, sen ia influo en la laborista movado. Lastatempe aperis en SAT-organoj artikoloj atakaj al Sovetio. Laŭ kongresdecidoj — ĝis nun ne nuligitaj — enpresigo de tiaj artikoloj (enŝovado de disputpunktoj) estas ne permesata. Kiel amiko de Sovetio, malaprobante la aperigon de tiaj artikoloj, mi per mia propono (1) celas elvoki klaran eldiron de la SAT-anaro, ĉu ĝi deziras konservi sian senpartiecan starpunkton ankaŭ rilate al Sovetio k la Komunista Internacio, aŭ ne.

Por eviti, ke la frakcioj uzu la SAT-organojn por atakoj al aliaj tendencoj, mi faris la proponon (2), kiu fiksas taskon k rajtojn de la frakcioj.

## Pri la Parizaj trafikiloj

Por ke la K-doj, kiuj venos por kongresi en Parizo, rapide estu kutimigataj al la uzado de la parizaj trafikiloj, mi donos ĉi tie kelkajn klarigojn.

La plej rapida transportilo estas la *Subtera fervojo*, kies reto kovras la tutan Parizon k parte etendiĝas eĉ ĝis la antaŭurboj. Ekzistas du kompanioj subter-fervojaj ; la plej granda (11 linioj) estas « Métropolitain » (mallongigite « Métro »), la alia (2 linioj) nomiĝas « Nord-Suda » k havas interkomunikon kun la « Métro »-stacioj. La stacioj estas ĉie en la stratoj de malproksime rekoneblaj, vespere lumigitaj. Eĉ sen la surskribo « Métro » oni facile ekvidus la alirejojn. Ĉe ĉiu stacio *(ekstere)* troviĝas surkartona plano de Parizo kun la tuta « Metro »-retaro k kun indiko per ruĝa globeto de la loko, ĉe kiu oni troviĝas. Tiu ĉi sistemo treege faciligas la orientiĝon ; oni ne bezonas sekve demandi pasantojn, kies lingvon oni ne komprenas. *Subtere* oni trovas ĉe la staciaj kajoj la samajn urboplanojn, en la vagonoj mem la vojoplanon de la linio kun indiko pri la *ŝanĝ-stacioj* (por transiri de unu linio al alia). Eĉ sur la vagonpordoj oni trovas tian lini-planon. Kiam oni atingis ŝanĝo-stacion, oni rigardas sur la kajo, kiuloke troviĝas la flavlume heligita ŝildo « Correspondance » (Komunikiĝo). Oni laŭiras en tiu direkto k trovas sur la muroj ŝildojn, kiuj precizigas per sagoj k staci-tabulo, kiun vojon oni devas trapasi por trovi la ŝanĝ-linion, uzendan por trafi la celatan stacion.

En ĉiu okazo, kiam oni deziras subter-fervoje atingi difinitan stacion, kiu *ne* estas la finpunkto de linio, oni devas suriri tiun kajon, ĉe kiu estas indikita kiel direkto la *finstacio de de la linio*. Ekzemple, por atingi subter-voje de la Norda stacidomo *(Gare du Nord)* la subter-stacion *Ecole Militaire* (la stacio plej proksima al la Kongresejo : *Salle Adyar)*, oni uzas unue la linion 7 (tra la apuda *Gare de l'Est*) en la direkto : *Palais-Royal* ; oni elvagoniĝas ĉe la stacio *Opéra* k uzas de tie la linion 8 en la direkto : *Auteuil*, elvagoniĝante ĉe la celata *Ecole Militaire*.

Ĉe grandaj distancoj iom pli karaj estas la *Aŭtobusoj* (kiuj iom post iom anstataŭas la malmodiĝintajn tramojn) ; ili estas signitaj kutime per literoj, kelkfoje ankaŭ per ciferoj (nome kiam ili anstataŭis tramojn, kiuj havis la samajn ciferojn). Ni rekomendas al la K-doj, venantaj de *Gare du Nord*, uzi la aŭtobuson AC, kiu kondukas ilin por 0.90 fr. — 3 sekcibiletoj — (se ili aĉetas biletlibreton, nomatan *carnet* (prononcu :

karne) kun 20 sekcibiletoj por 6.— fr.) *rekte* ĝis la kongreseja apudo, nome *Champ-de-Mars*, la finstacio de la linio. La tarifsistemo k la biletoj estas la *samaj* kiel por la tramoj. Prezo : 0.30 fr. por sekcio, sed minimume 0.60 fr. — kondiĉe ke oni aĉetis *carnet*, kion ni nepre rekomendas, ĉar aliel la prezo plialtiĝas je 0.10 fr. por ĉiu sekcio.

Lu-aŭtomobiloj (« taxi ») estas rekomendindaj nur, se pluraj personoj uzas ilin kune, k se oni deziras eviti la transportadon de kofroj k valizoj tra subteraj stacioj aŭ sur aŭtobusaj peronoj. Oni havas tiam la garantion alveni plej rapide k plej rekte al la celo, k la prezo estas modera, precipe se la pago dividiĝas inter pluraj personoj.

Kun plezuro la Kongres-Komitato sciigas, ke je la dispono de la kongresanoj estos *Plano pri la pariza subterfervoja relaro kun esperanta teksto.*

*N. B.*

## EN PARIZO ANTAŬ 64 JAROJ

En tiuj ĉi lastaj tagoj de l'maja monato, antaŭ sesdek kvar jaroj, plenumiĝis inter la muroj de Parizo terura tragedio. Brulegoj ruĝigis la ĉielon, kanonoj detruis per siaj obusoj kune kun tombejaj muroj la lastajn rezistantojn de la Komuno, tiu unua provo de laborista regado en la historio de nia epoko. Komenciĝis ekstermado al la Pariza popolo, kiu havas en la historio nenian egalon, escepte eble la last-oktobran batalon en Asturio.

Antaŭ la urbopordegoj tiutempe gardostaris la prusoj sub Bismark. Kaj kun granda intereso la observanto rimarkos, ke antaŭ tiuj prusoj jam estis kapitulacinta la reakcia franca registaro de *Tjer* (Thiers), sed ke male la Nacia Gvardio, formita el etburĝaj k proletaj elementoj de la pariza loĝantaro, preparis la defendon de la urbego, rifuzante pro naciaj konsideroj la submetiĝon. La defendo de la Gvardio esence celis la eksteran malamikon, sed por ebligi tion, la popolo unue devis renversi la propran burĝan registaron. Kaj tion ĝi faris la 18-an de marto 1871, traktante Tjer k liajn ministrojn kiel perfidulojn de la nacio. La nova pariza registaro formis koalici-administradon el membroj de la I-a Internacio, Blankianoj, Prudhonanoj, burĝaj respublikanoj k seniluziigitaj patriotoj. Ĝi *ne* estis « proleta diktatoreco », ĉar... 8 tagojn post sia formiĝo ĝi apelaciis al la universala voĉdonrajto de Parizo, kiu elektis demokratan komunum-administracion. Grandanime ĝi lasis trankvilaj la kontraŭulojn, kiuj havis sufiĉe da tempo por en Versajlo, kien la registaro rifuĝis, restarigi sian reakcian civilmilitan armeon, kiu fine de majo estis detruonta la fortojn de la pariza popolo.

Karlo Marks skribis pri la tiama eraro de la popolregistaro tre indulgeme, tamen riproĉe, jenon en « Intercivitana milito en Francio » (II. ĉap.) : « Anstataŭ marŝi kontraŭ la tiutempe tute senhelpa Versajlo, oni permesis al la ordopartio ankoraŭfoje provi sian influon ĉe la balot-urno, kiam la 26-an de marto estis elektata la Komuno. En tiu ĉi tago la ordopartianoj interŝanĝis en la balotejoj ĝentilajn vortojn de l'interpaciĝo kun siaj, ho, tro grandanimaj venkintoj, samtempe murmurante en siaj koroj solenajn promesojn, siatempe sange venĝi sin. »

En majo la Blanka armeo de Tjer, helpate de Bismark, marŝis kontraŭ Parizon k supervenkis la parizan popolon post longa, heroa defendobatalo. La blanka teroro, sekvanta la malvenkon, la *Sanga Semajno* (21./28. majo) restos neestingeble gravuritaj en la memoron de la tutmonda laborularo. Miloj da mortigitoj (oni taksas ilin je 30.000), miloj da deportitoj estis la bilanco de la blanka venĝo. Eĉ la respublikana, ne socialismema granda franca aŭtoro *Viktoro Hugo* estis terurita antaŭ la vido de tiom da sangverŝado k da maljusto kontraŭ la popolo. En sia bela poemego « La Terura Jaro » li esprimas per potencaj k majestaj versoj sian... pli vere kompaton ol favoron al la parizaj komunanoj, priskribante kruel-agojn k batal-scenojn eterne legindajn por la posteuloj.

El laborista plumo la plej valora verko pri la Komuno estas skribita de *Lisagare* (Lissagaray) ; ĝi ne nur fidele spegulas la Historion de tiuj monatoj, sed ankaŭ reflektas la animstaton de l'komunanoj k havas literature tre altan nivelon[1].

Unuafoje en tiu ĉi jaro estis aranĝata ampleksa *Ekspozicio pri la Komuno*, en kiu estis videblaj dokumentoj k objektoj de la epoko. Ĝi okazis en la komuniste administrata urbo Sankta Dionizio (St. Denis), antaŭurbo de Parizo. Bedaŭrinde ĝi estos fermita antaŭ la okazo de la 15-a SAT-Kongreso. Tamen la Parizaj K-doj, kiuj gvidos la vizitontojn tra la urbo, volonte montros al siaj gastoj la memoraĵojn, kiuj rilatas al tiu heroa periodo.

*N. B.*

[1] Havebla *nur franclingve* ĉe SAT ; 580 paĝoj ; prezo multe reduktita : 17.50 fr. (antaŭe : 25.— fr.).

**Al tiu ĉi n-ro estas aldonita nova Prospekto pri la "Plena Vortaro de Esperanto" (2-a eldono), kiu aperis ĉe SAT. Ni rekomendas ĝin al la atento de la Legantaro.**

## INTERHELPA ABONSERVO

| | | |
|---|---|---|
| Zaandamaj lab. esperantistoj (kolektita de K-dino Taanman) | guld. | 5.60 |
| Joh. Peterse, Rotterdam | » | 1.— |
| Amundsen, Oslo | fr. fr. | 10.— |
| J.C. Kries, Zaandam | guld. | 2.50 |

## Ĉe la Laboristaj Esperanto-Asocioj

### *La Kongreso de FEO[1] en Marsejlo*

La ĉi-jara Kongreso de la LEA por franclingvaj regionoj (FEO) okazis de 20/22. aprilo en *Marsejlo*, tiu grava sudfranca havenurbo. La nombro de vizitintoj estis reduktita per la situo de la kongresurbo, kiu ne permesis al la multaj pli norde loĝantaj K-doj (k precipe ne al belgianoj) partopreni, pro la malproksimo. La Federacian Komitaton reprezentis K-doj *Pâris* k *Robert*. La agadraporto de la Komitato estis longe k vigle pridiskutata. Precipe la debato turniĝis ĉirkaŭ la organo (« *Le Travailleur espérantiste* »), kies neregula apermaniero k ankaŭ ekstera aspekto malkontentigis multajn K-dojn. Oni proponis ĉiumonatan aperadon, se eble, k oni postulis, ke almenaŭ ĝi estu tute regule aperigata, pri kio zorgu la redaktoro k la ekspedisto. Oni deziresprimis trovi en la gazeto artikoletojn en esperanto apud la grandaj franclingvaj princip-artikoloj k ankaŭ paĝon por la komencantoj kun gramatikaj ekzercoj. Ĉiuj aprobis tiun proponon. Aliaj proponis, ke oni publikigu adresaron de grupoj, sekretarioj, kunven-lokoj, izoluloj en la gazeto. Al tio kontraŭis la reprezentantoj de la estraro.

Pri la problemo de l'reunuigo de la lab. esp. movado la diskuto estis afabla. Komitatano Pâris legis diversajn dokumentojn ricevitajn de la skisma organizo k rezolucion prezentatan de la Komitato. Oni elektis 7-personan komisionon, kiu verkis definitivan tekston de rezolucio, per kiu oni konsentas pri komuna agado rilate la propagandon ĉe diversaj organizoj, ktp, sub la kondiĉo, ke organize oni atentu la statutparagrafon, kiu ligas nin kun SAT.

La agadraporto fine estis aprobata, ankaŭ tiu de la gvidanto de la koresponda kurso (E. Robert). Por elekti la novan Fed. Komitaton estas denove komisiita *Parizo*. La proksiman kongreson organizos *Havro* (Le Havre).

*E. R. (741).*

[1] LEA por franclingvaj regionoj.

### *Jarkonferenco de S.A.T.E.B.*[1] *en Handforth*

La SATEB-jarkonferenco okazis en Handforth (Cheshire) la 21-an de aprilo. Ĉeestis 30 anoj, ĉefe el la Manĉestra regiono. K-dino *Ruth Dean* prezidis. K-do *Rosenbloom*, sekretario, raportis pri la administrado k la klopodoj faritaj por ĝin bonordigi. La Bulteno de SATEB aperos de nun pli regule. Ĝi estu la ĉefa instigilo. Estas starigita perkoresponda kurso (« poŝta kurso »), kiun verkis K-do *B. Roberts*; la centra adreso por la kurso estas : 45 Amos St., *Manchester* 9. La lecionojn korektas K-do *T. Sugar*. Kiel « alilanda sekretario » funkciis K-do *D. Greenberg*, 33 Cliff St., *Manchester* 4. Kotizpagis 63 K-doj (49 grupanoj, 14 izoluloj). La redaktanto de la Bulteno (K-do Roberts) raportis pri la progresoj faritaj rilate ĝian enhavon. Dissenditaj estas 280 ekz-oj. K-do *Spiller* raportis pri la librofako, K-do *Sulski* pri sia laboro kiel ĉefperanto de SAT. Post aprobo de la raportoj okazis rek nov-elektoj de la estraro. La grupoj de Manĉestro k Salford informis la konferencon, ke ili invitos la 16-an SAT-Kongreson al Manĉestro (1936).

*Ĝis finredakto de tiu ĉi n-ro ni ankoraŭ ne ricevis raporton pri la Federacia Kongreso de la nederlandanoj okazinta en* Groningen. *Tamen ni estas informitaj pri tio, ke okazis dum tiu Kongreso speciala kunsido de la SAT-anoj, en kiu oni elektis K-don* Bas Wels *(Roterdamo) ĉefperanto por la nederlandlingva teritorio ; lia ĉefa tasko estos sistema varbado por nia organizo.*

[1] SAT en Britio.

**GRUPO DA LERNANTOJ** dez. kor. k. interŝ. PI k PM kun ĉ.l. Respondo garantiata. Skribu al : *L.E.S. Antaŭen*- Rua da Costa, 124, 1°, *Lisboa*, Portugalio.

## POR ŜTOPI LA BREĈON

35. *listo.*

| | | |
|---|---|---|
| A. Andersson (17 574), Stokh. ADLEL-resto | fr. fr. | 20.75 |
| Kamparanino | » | 40.05 |
| A. Oskam, Rotterdam | » | 13.— |
| Amundsen, Oslo | » | 12.— |
| P. Cugny, Dijon | » | 6.25 |
| P. George, Rougiville | » | 26.50 |

Multe oni parolas nuntempe pri Unueco en la Lab. Esp. Movado. Sed por povi prijuĝi la situacion, oni devas koni la kaŭzojn, kiuj kondukis al la disiĝo. Por tio havigu al vi la ĵus aperintan broŝuron interesan k instruan

**HISTORIO PRI LA SKISMO**
**en la laborist-esperanta movado**

20 paĝoj. Formato 13×20 cm. Prezo : 2.— fr. fr. afrankite. Ni liveras 5 ekzojn por favorprezo de 7.— fr. fr. afr.

**SAT,** 67, *avenue Gambetta, Paris* 20.

## EL NIA LETERUJO

*K-do el* Aŭstrio, *ankoraŭ ne longe en niaj vicoj, liveras per sia letero ekzemplon pri tio, kiel sopire estas atendataj de multaj en faŝistaj landoj « S-ulo » k « Senn. Revuo »:*

« ... Antaŭ ĉio mi devas sciigi al vi, ke ambaŭ gazetoj tre, tre plaĉas al mi k mi sentas legante ilin, ke nenia cenzuro ekzistas ĉi tie en Aŭstrio. *(? Red.)* La ĝojon mi tute ne povas priskribi k mi atendas ĉiam senpacience la sekvontajn n-rojn. La gazetoj, kiujn oni ricevas ĉe ni, ne estas legindaj k tial estas ĉiam agrable, se mi povas ekkapti gazetojn eksterlandajn. Plej inda ŝajnas al mi « S. R. ». Ankaŭ « S-ulo » tre plaĉas al mi... »

*Gek-doj iom bonstataj, memoru pri la helpkaso fondita por faŝist-landanoj en mizerstato ! Ĉiu obolo kolektita kontribuos al verŝo de ĝojo en sopirantajn korojn.*

*K-do J.S. (Oerebro) priskribas al ni en longa artikolo, kiel oni preparas la estontan militon en Svedio. Ni ekstraktas :* « ... Antaŭ nelonge la plej granda sveda armilfabriko Bofors (proks. 7 kilom. de Oerebro) por enk eksterlandaj militekspertoj prezentis sian plej novan kreaĵon : 40-milimetra tutaŭtomata aerdefendkanono, kiu ĝis 7.500 m. povas trafi la celon k elpafas 135 pafojn minute. Oni bezonas nur kelkajn sekundojn

## Planimedo gvidas kurson

La Grupo troviĝis en granda embaraso en tiu ĉi vintro. Mankis kursgvidantoj. Preskaŭ ĉiujare ripetiĝis la sama fenomeno, sed tiun ĉi fojon ĝi alprenis formojn vere harstarigajn. Angoro sufokis la gorĝon de la grupa sekretario, k li apenaŭ evitis svenon, — kiam Planimedo, sin ekĵetante antaŭen kun drameca gesto, anoncis sian kuraĝan intencon preni sur sin la gvidadon de kurso.

La grupa sekretario faris grandajn okulojn, k estas malfacile diveneble, kia evoluo da ideoj trapasis malantaŭ lia frunto. Tamen, post sekundoj da konsterna muto, dum kiu Planimedo observis scivoleme la ŝanĝiĝantan vizaĝo-ĉielon jen tre nuboplenan, jen sunradian, de la sekretaria moŝto, ĉi tiu etendis la manon al Planimedo kiel dronanto, kiu kaptas al savilo — eĉ se tiu savilo estus nur pajlero...

La okuloj de Planimedo ekbrilis, k estis io malseka en ili.

— Do, mia kara Planimedo, vendredon je la dudeka horo akurate vi troviĝu ĉe la sojlo de la urbdomo de Novmondo, kie okazos *via* kurso, subvenciata cetere de la loka komunumestraro. Estas do tre necese, ke vi bone preparu vin por tiu grava tasko k ke vi aspektu inda k aŭtoritata kursgvidanto !

Planimedo promesis tion solene k viŝis ŝvitogutojn de sia larĝa frunto.

Planimedo preparis sin fervore por la inaŭguro de *sia* kurso. Merkredon li tralegis la ĉapitron pri prononcado en esperanto k rekomencis fari tiujn dolorigajn ekzercojn pri la mez-malfermita sonformado de la vokaloj, kiujn li jam estis farinta — kiel ni scias — okaze de sia bedaŭrinde tiom malsukcesinta grup-parolado. La dom-najbaroj ree akriginte siajn orelojn, falis en obtuzan malesperon, aŭdante la renaskiĝintajn parolekzercojn antaŭspegulajn de Planimedo.

— La malsano lin ree atakas ! ili flustris. — Kia plago por ni !

Kaj la radio-aparatoj komencis koncentrigi de ĉiuj flankoj siajn potencajn bruojn por mortsilentigi la kompatindan voĉon de Planimedo...

Ĵaŭdon, Planimedo iras al gladistino, kunportante sian plej bonan dimanĉan vestaĵon, — por ke li aspektu inda k aŭtoritata antaŭ la kursanaro. Vendredon, la fatalan tagon, li nek tag- nek vespermanĝas sed nur trinkas buljonon sengrasigitan k tason da nigra kafo. Poste li enaŭtobusiĝas k atingas tre rapide la urbdomon de Novmondo, kie estas la finstacio de la aŭtobusa linio. Feliĉe ! ĉar Planimedo estis profunde enfosiĝinta en la temaro de sia lernolibro, k la biletisto devis kriegi en liajn orelojn :— Finstacio ! Ĉiu eliru !, por ke li saltleviĝu kun distrita k fora mieno.

Unu el la grupanoj ĉeestas por la helpo al Planimedo en la organiza tasko de la unua vespero, distribuado de lerniloj ktp. Febre Planimedo petas tiun Kamaradon, resti tute proksimege apud li k subteni lin en okazo de bezono, ĉar li havas senton de svenemo vid-al-vide de la giganta tasko, kiu atendas lin... Dum la K-do-helpanto distribuas lernilojn, Planimedo staras senmove, absorbite plene per la belaspekta nigra tabulo, kiu troviĝas en la fundo de la ĉambrego.

Li pensas pri ĉiuj nigraj tabuloj, kiuj kirliĝis tra lia vivo, komence de iu nigra tabulo, antaŭ kiu li staris tremmane k emocie kiel sesjarulo...

Fine la helpanto atentigas lin, ke ĉiuj lernontoj estas priservitaj k

por pafpretigi la kanonon. Ankaŭ Malmö-a fabriko zorgas pri militpreparado : Ĝi liveris en 1933 ĉ. 400 mil obusojn, 200 mil gasbombojn al la sveda armeo, krom aliaj armilspecoj. Ĉi-jare oni produktis 17 mil municikestojn, 11 mil obus-direktilojn, 300 selojn por municitransportoj ktp. Dum la lasta tempo oni ĉiuvespere kromlaboras. Tiel same en metallaborejo en Landskrona, kie oni nun fabrikas 7 kanonturojn menditajn de Bofors por Persio. Ankaŭ la svedaj militistoj propagandas, aranĝante kunvenojn tra la lando, por populargi la armeon... »

*K-do* Woso (13 768) *el Brilio notas por ni laŭ « Nova Gvidanto » (New-Leader) :*

« La nacia registaro de Britio fanfaronas, ke la ŝtata buĝeto favoras la malriĉulojn. Sed fakte la malo estas vera. Laŭ financa spertulo de « Ĉiutaga Heroldo » la loĝantoj havantaj salajrojn de pli ol 250 £ jare pleje profitas. Sed 90 % el la loĝantaro estas sub tiu ĉi enspezo. 17.625.000 laboristklasaj familioj havas pli malaltan salajron. Ilia sola silentigilo estas pli malkaraj sidlokoj en la kinejo ! La amasoj devas pagi laŭ kreskanta proporcio nerektajn impostojn (anstataŭ 7 ŝil. 10 pencoj en 1932 ili devas pagi nun 9 ŝil. 4 p. jare). La riĉuloj, kiuj pagis 12 ŝil. 2 p., nun pagas nur 10 ŝil. 8 p... »

## Komuniko de la Sennaciista Frakcio

Kiel anoncite en la februara n-ro de « S-ulo », la Frakcio nun disponas presitan organon, kiun la Gek-doj povas utiligi por diri tion, kio ne estas direbla en aliaj gazetoj. Sekve, la apero de *Herezulo* neniel konkurencas al SAT k neniu povas dubi, ke la sennaciistoj restas la plej fidelaj anoj de nia komuna mondasocio.

El la unua n-ro de *Herezulo* jam 1.400 ekz-oj estas senditaj al la adresoj, kiujn ni povis antaŭe kolekti. Ĉiuj K-doj, kies nomo troviĝas en la Jarlibro, ricevis tiun n-ron. Sur blua folio, aldonita al ĉiu ekz-o, ni petis, ke la ricevontoj bonvolu resendi ĝin, se ial la revueto al ili ne plaĉas. Sufiĉas ja en tia okazo simple redoni la kajeron al la poŝtisto, skribinte sur la banderolo la vorton : *Rifuzita.* Ĝis nun apenaŭ 30 ekz-oj revenis al ni kun tiu mencio. Ĉu estas espereble, ke la aliaj ricevintoj tenas la kajeron kun la intenco sendi sian abonmonon ? Se tiel estas, ili bonvolu ne prokrasti en la plenumo de sia devo. Ni ja ne volas kredi, ke ili intencas avare konservi la bonfide senditan ekz-on. Ĉiu ricevinto rapide do sendu al ni 4 *stampitajn* internaciajn respond-kuponojn au 6 fr. fr., adresitajn al jena poŝta ĉekkonto : *E. Adam*, Paris 1350-62.

Ni jam ricevis kelkajn gratulajn k kuraĝigajn leterojn, per kiuj estas videble, ke *Herezulo* trabatos al si vojon k sukcesos elkrii verojn, kiuj sendube sonos malagrable en la oreloj de fanatikuloj k eĉ en tiuj de tro fidemaj bonintenculoj. Vero povas atendi ; mensogo k blufo ne daŭre eltenos.

Sennaciistoj ! prenu lokon sur posteno ; varbu abonantojn al *Herezulo* ; skribu al ni ; faru sugestojn, proponojn ; ĉiel kunlaboru...

La dua n-ro de *Herezulo* aperos en junio k estas sendota nur al tiuj, kiuj abonis.

Por la *Sennaciista Frakcio el membroj de SAT.*

*E. Lanti.*

## Komuniko de la Socialista Frakcio

La eldono de « Socialismo » devis esti prokrastata pro nesufiĉa abonintaro. Ĝi nun povas esti entreprenata, k la unua n-ro aperos en majo. Ĝi enhavos artikolojn pri la celo de la Frakcio, pri organizo de peresperanta kunlaboro de ĉiuj socialismanoj en la kadro de SAT k de poresperanta laboro k varbado al la unuecaj LEA-oj en la socialistaj medioj, pri la problemo de agadunueco. Ĝi ankaŭ entenos proponon de regularo ekzamenota de la venonta Frakcikunsido.

Pro tio, k por ebligi regulan aperon k bonan enhavon de la bulteno, ni petas :
1) Ke K-doj persone *abonu la gazeton* k *kolektu al ĝi abonojn* en siaurbaj LEA-grupoj aŭ SAT-rondo. Abono al *ses* numeroj : 3 francaj frankoj, du internaciaj respondkuponoj aŭ sama valoro al SAT aŭ al *A. Pâris*, 6 villa Sabot, *Malakoff*, Seine, poŝtĉekkonto : Paris, 1089-24. Francaj poŝtmarkoj estas akceptataj. 2) Ke ĉiulandaj K-doj *sendu artikolojn k notojn* por « Socialismo ». Publikigataj estos nur tiuj, kiuj ne havus lokon en « S-ulo », t.e., kiuj rilatas nur la problemojn speciale stariĝantajn antaŭ la socialistoj.

*A. P.*

---

okupis lokon sur la benkoj k ke ili nun atendas konatiĝi kun la kursgvidonto. Planimedo, kuraĝe, kvankam iom pale, serĉas la kontakton, kiun laŭsperte bezonas ĉiu kursgvidanto por povi efike instrui. Li rondirigas siajn okulojn, esplorrigardante ĉies fiziologion k fizionomion. Lia rigardo estas miksaĵo el scivolemo k timo ; en ĝi kuŝas ia peto pri helpo, ia peto pri indulgo... Almenaŭ tiom longe, kiom la rigardo trafas virojn k junulojn. Sed, ve, en unu angulo troviĝas kvaro da junulinoj kun ridemaj, gajaj rondvizaĝoj, k tute beletaj ankaŭ ili aspektas. La rigardo de Planimedo vualiĝas. Li ne estis antaŭpensinta pri tio ! Se la grupa sekretario almenaŭ estus preparinta lin pri tiu afero ! Sed li neniel sonĝis pri tio, ke povus ĉeesti lian kurson reprezentantoj de la alia sekso ! Liaj genuoj preskaŭ rifuzas porti lin.

— Kuraĝon, flustras la helpanta K-do senĉese, kuraĝon ! Vi jam trovos la kontakton, ne timu — post la unua leciono ĉio iros tute glate !

La rigardo de Planimedo glitas aliflanken, k li kredas aŭdi mokridetadon el la junulina angulo, kie embuskas malbenitaj gajaj okulparoj.

— Faru enkondukan paroladeton, flustras la helpanto. Rapidu, por ke rompiĝu la glacio ! — Kaj Planimedo komencas rompi la glacion. Kun la tuta flama ardego, kiun povas enteni la koro de verdstelulo, kun la sankta fervoro de misiisto li prezentas al la profanuloj la personon k la verkon de Zamenhof, elmontras li la urĝan neceson eklerni tiun ĉi belsonan k agrablan k logikan k facilan k mirindan k elastan k grandiozan k flekseblan k rave sorĉan k praktikan k velurecan k nesupereblan lingvon, kia estas esperanto.

Tiam la peza artilerio eksilentas.

— Ĉu la pozicio estas matura por ekokupo ? — ĵetas nun okulsignale, demande la glacirompanto al la helpanto. Ĉi tiu kapsignas : — Provu nun !

Kaj li provas, faletante trans la plektbarilojn de la prepozicioj, la truojn de la participoj k la pikildratojn de la akuzativa defendlinio. Li ekkuregas, foliumante antaŭ la konsternitaj gekursanoj la tutan lernolibron dum impet-atako daŭranta duonanhoron.

En tiu ĉi unua leciono Planimedo konatigas siajn viktimojn kun ĉiuj 16 fundamentaj reguloj de la gramatiko, pluse granda parto de la oficiala radikaro k la sekretoj de la esperanta sintakso. Kaj fine ekhaltante li diktas, vera aŭtoritatulo, al la gemalfeliĉuloj skriban taskon sespaĝan k la parkerumadon de 250 vortradikoj.

— Estas iom multe, opinias la K-do helpanto. Sed Planimedo insistas, rimarkigante, ke li preferus ne daŭrigi la kurson ol gvidi ĝin laŭ limaka temporitmo k per troa indulgemo.

— Ĝuste tio estas la provilo, ĉu ili indas iĝi veraj disĉiploj de Zamenhof ; se ili ne fervoros k ne konsciencoplene plenumos siajn taskojn, nu, mi forpelos ilin ; ili iru al la diablo !

Li rigard-esploras la mienojn de la viktimoj. La kapoj de la kvar junulinoj ŝajnas rigidiĝintaj ; ili tre similas al la kapo de la edzino de Lot, kiu estis transformita en salblokon pro sia scivolemo.

Tio kolerigas Planimedon tiagrade, ke li sin klinas al la helpanta K-do kun la rimarkigo, ke li emus dikti al tiuj junulinoj ankoraŭ ekstran taskon. Sed la helpanta K-do per granda peno sukcesas eviti tiun malfeliĉon, kvankam li ne sukcesas konvinki la glacirompulon pri la maltrafo de tia procedo.

*Nubo.*

# En nia movado

(Kroniko)

BRITIO. Eksterlandaj Gek-doj vizitontaj *Londonon*, ne forgesu viziti la lokan Lab. Esperanto-Klubon, adreso : 144, *High Holborn, W.C.* 1. Malfermata ĉiun sabatvesperon de la 18.30 h. Vi ĉiam renkontos bonan amikecon en la Klubo.

NEDERLANDO. La SAT-rondo en *Zwolle* okazigas monatajn kunvenojn. Je 5. majo K-do *Brandsma* lekciis pri Voltaire, pritraktante lian vivon k batalon kontraŭ dogmoj. Proksimfoje okazos parolado de K-do *Goudbeek* pri « invento de la pres-arto » ĉe K-do *Bos*, Deventerstraatweg 18. Ankaŭ Gek-doj, nemembroj de SAT, ĉiam estas bonvenaj.

NORVEGIO — *Ostfold*. Post sukcesaj kursoj en 6 diversaj lokoj de Ostfold fondiĝis ĉi-vintre jenaj grupoj : « Ponto » en Sarpsborg, « Torĉo » en Fredrikstad, « Ascendo » en Halden, « Al Venko », en Torp, « Martelo » en Opsund k « Konkordo » en Hafslundsøi. Je 28. aprilo okazis tut-regiona kunveno en la popoldomo en Sarpsborg, kiun ĉeestis 45 K-doj. Dekdu faris mallongajn paroladojn pri div. temoj. Oni decidis raporti regule en « S-ulo » k en la sveda gazeto prol. esp-ista, tiom longe kiom ne aperas norvega organo. Lastan dimanĉon en aŭgusto okazos tutregiona kunveno en Halden. Ĉiuj lab. gazetoj enmetas regule artikolojn pri esp., ĉiutagan esp-programon. Kun subteno de la lernejaj estroj okazas nun elementa kurso senpaga por pli ol 100 infanoj de l'sesa k sepa klasoj, kiujn gvidas K-doj-instruistoj J. Kristiansen k J. Olsen. K-do Aling Ajo komencis novajn kursojn en Hafslundsøi, Torp, Greåker k Skjeberg.

PORTUGALIO. Kunsido de la SAT-rondo *Lisbona* (je 1. aprilo) decidis zorgi pri plivigligo de la propagando por SAT, same kiel pri pli akurata monpago al la administracio, por eviti interrompon en la ricevado de la organoj. K-do *L. da Cruz* donacis al la rondo nigran tabulon. Oni decidis kolekti monon por povi sendi delegiton al la Pariza SAT-Kongreso. (*J. P. Candido*, 18 899.)

# TRA LA ESPERANTA GAZETARO

*Naciismo k esperantismo.*

Kiu legas la naciajn gazetojn de la neŭtrala esperanto-movado, tiu renkontas ripete la klopodon pravigi la naciemon k harmoniigi ĝin kun la ideo pri internacia lingvo.

*La Suda Stelo*, jugoslava asoci-revuo, stile k enhave estas aparte menciinda, ĝi tuŝas en sia marta n-ro denove tiun ĉi temon k konkludas : « Sana k vastrigardanta naciismo estas necesa fazo dum la evoluo de ĉiu popolo. Ĝi kreas la tre necesajn kondiĉojn por la atingo resp. alproksimiĝo al la fina idealo de l'esperantistaj klopodoj, al la homareco. »

Oni povus verŝajne pli facile interkompreniĝi, forlasante la malprecizan esprimmanieron k finfine donante al la « sana k vastrigardanta naciismo » klaran difinon. Penetrante ĝis la fundo de la problemo oni verŝajne malkovros la senenhavon de tiaj frazoj, kiuj ja certe reflektas iujn ĝustajn sentojn, sed tiom malklarajn, ke ilia analizo estas necesa. La jugoslava « nacio » mem estas ekzemplo tre elokvente montranta la arbitran karakteron de tia rigardmaniero.

*La faŝist-aspiranto en Japanio.*

*Oomoto Internacia* (aprilo) konfesas, ke la naciismo en Japanio faras grandan progreson. Sed « temas pri *tute alia speco* de naciismo ol la germana aŭ la itala ». Do ni paroligu la « Majstron » mem : « Mi sentas min multe kuraĝigita, trovante ke la pensoj de la nuntempaj herooj, kiel Kemal Pasha, Musolini, Hitler k.a. tre similas al tiuj, kiujn mi jam delonge en mi tenas. Nepre mi konstruos novan Nipponlandon. Mi ne faras nepagotan kambion, kiel aliaj movadogvidantoj. Mi nepre realigos, kion mi unu fojon eldiris — per fortika organizo, potenca propagando k per agado bazita sur la justeco. »

Kompreneble neniu konfesus bazi sian agadon sur maljusteco, ĉar tio estas vorto klara sen plua difino. Sed kion la Majstro nomas justeco ?

*Kompleta unueco sub neŭtrala standardo* ?

S-ro Petit utiligas denove « Franca Esperantisto »-n (n-ro 15), por prezenti siajn ideojn pri la reenkorpiĝo de la laborista esp. movado en la neŭtrala tendaro. Li citas preskaŭ laŭvorte la lastan alineon el la unua paragrafo de la SAT-Statuto k demandas : « Ĉu tiaj principoj ne reprezentas la komunan idealon de la esperantistoj ? »

Sed li aldonis al tiu citaĵo etan vortparon « politike neŭtrala » (esperantismo), k eliminis alian vorteton « klasa ».

S-ro Petit devus finfine distingi inter du aferoj tute malsamaj : la *propagando* k la *utiligo* de esperanto por difinitaj celoj. Por pliefikigi la unuan, certe neniu esp-organizo rifuzos sian helpon en komuna agado, kiam tio estas ebla. Estus ja sensence, se oni malhelpus la propagandon k se oni ne farus ĉion por akceli ĝin. Sed rilate al la dua punkto, s-ro Petit povus ŝpari inkon k tempon k povus utiligi ambaŭ por informi sin iomete pli precize pri historio k faktoj en la laborista movado esp-ista.

« *Fia pensmaniero* ».

En *La Socialisto* (aprilo) ni trovas la supran flatan epiteton, por karakterizi nian sennaciecan koncepton pri organiza principo. La verkinto ektrovis, ke oni forgesis, « ke ĝi ja nur estas *formo* ». La tuta artikolo montras, ke li intermiksas, kiel tiom ofte estas farite, la doktrinon de *Sennaciismo* kun la organiz*formo sennacieca* de SAT. Kaj tute senbaze li finas : « ... la SAT-estroj faras el la organiza formo *idolon*, kiun ili alpreĝas, fermante la okulojn antaŭ la veraj problemoj. »

*H. P.*

*Nova batalanto sendogmema:* « *Herezulo* ».[1]

« Herezulo. Sendependa Revuo por batalado kontraŭ ĉiajn dogmojn. » Titolo k subtitolo, kun la aldono, ke la redaktoro estas K-do *E. Lanti*, sufiĉas kredeble por veki la intereson de la SAT-anoj k ĉiuj amikoj de liberpensado por tiu ĉi nova revuo. Ĝi vere meritas la intereson de tiuj, kiuj batalas kontraŭ diktatoroj k dogmuloj, por justo k libero. « Herezulo » cetere « estas daŭre k senrezerve en la servo k dispono de la « Sennaciista Frakcio » el membroj de SAT ». La ĉefa parto de la unua n-o konsistas el « publika letero al la adeptoj k simpatiantoj de l'sennaciismo » pri tiu lasta ismo. Ĉi tiu « Letero » celas pravigi la ideon de l'sennaciismo. Ankaŭ la cetera enhavo estas tre leginda k pripensinda. Lingvo k stilo estas tre bonaj. Kial estas uzita la formo « katalono » anst. la klasika « katal-uno » ?

*N. B.*

## Memornoto

PRIESPER. ARTIK. K NOTOJN ENHAVIS : *Signalen*, Stokh. 1., 9., 18., 25.4. ; *Arbetaren*, Stokh., 9.4. ; *Wij*, Amsterd., 12., 19.4 ; *Volksblad*, Groningen, 20.4. (saluto al FLE-kongreso *en* esp-o) ; *Skaraborgaren*, Falköping, 26., 29.4. ; *La Voix libertaire*, Limoges, 4.5. ; *La Revolution prolétarienne*, Paris, 25.4. (let. de K-do Lanti pri sennaciismo kun mencio de SAT).

## Radio-notoj

La Minska stacio disaŭdigas denove ĉiumonate la 2- 6- 9- 12- 16- 18- 22- 24- 28- 30-an, je la 22-a horo laŭ MET, esp-ajn programojn.

[1] Trimonata. 16 paĝoj. Formato 13 × 20. Jarabono : 4 respondkuponoj aŭ 6 fr. fr. Poŝtkonto : *E. Adam*, Paris 1350-62. Red. k Adm. : *Esperanto*, 14, av. de Corbéra, *Paris 12*.

# Recenzejo

JULIO BAGHY : *Sur Sanga Tero*. Romano (daŭrigo de « Viktimoj »). Eldono de la aŭtoro. 264 paĝoj kun kliŝita kovrilpaĝo. Form. 12 × 17. Prezo broŝ. 4 sv. fr., bind. 5.50 sv. fr. plus 10 % por sendkosto. Havebla ĉe presejo *A. Szalay*, Kender-u. 39, *Budapest VIII* aŭ ĉe *Literatura Mondo, Budapest IX*.

Tiu ĉi originala romano el Siberio dum la civilmilito (1918-20) estos detale priparolata en la literatura organo de SAT (« Sennacieca Revuo »).

N. ŜVERNIK : *Pri reorganizo de laboro de la sindikatoj en USSR*. El rusa lingvo trad. de P. Gavrilov. Eld. Ekrelo-*Amsterdam* (F. Visser, Postbus 5, Z). 28 pĝ., form 13 × 17. Prezo ne montrita.

GRONINGEN. Bela plurkolora, arta prospekto kun multaj ilustraĵoj k tekstaj klarigoj en esp-o. 20 grandaj paĝoj. Eldonis la Societo por Fremdultrafiko, Groningen, Nederlando, kiu ĝin vaste dissendas. Pri petoj oni turnu sin al : *Mr. H.J. Buwalda*, Hooge der A 14 a, *Groningen*.

SVISLANDO : *Alpa Poŝtaro*, 1935. Faldprospekto ilustrita, eldonita en esp-o de la Ĝenerala direkcio de la svisaj Poŝto k Telegrafo, por varbi vojaĝantojn por siaj aŭtolinioj en la Alpoj. Senpage havebla ĉe Ĝen. Dir. de Svisaj Poŝto k Telegrafo, Inspektorejo de la Poŝtlinioj, *Bern*.

# Korespondado

ARGENTINIO

K-do *J. Rios*, ŝoforo, str. B. de Irigoyen 457, *Buenos Aires*, dez. kor. kun Gek-doj ĉl. Certe respondas.

DANIO

Dek gelernantoj dez. koresp. kun gelernantoj en ĉiuj landoj. Skribu al : K-do *Th. Jörgensen*, Grönnegade 3, *Ikast*.

NEDERLANDO

K-do *H. Jeuken*, Koningstr. 43, III, *Amsterdam-C.*, dez. koresp. kun ĉl. Gek-doj pri ĉt. Resp. garantiata.

20 gelernantoj dez. kor. kĉl. Gek-doj ; ankaŭ infanoj dez. kor. kĉl. infanoj. Certe resp. Skribu al: *R. Keppel*, Zuideinde A. 192, *Oostzaan*.

# FAKA MOVADO

Sindikato el apotekistoj-komizoj konsistanta el pr. 2.000 membroj, serĉas korespondantojn por sia gazeto « The Union Pharmacist » (La Sindikata Apotekisto). Adreso : Edward Ayash, Pharmacists Union of Greater New York, 55 West 42nd Street, New York City.

## JES ! ANKORAŬ VOKAS VALENCIO

## Grava Atentigo !

Valencio, la ĝentila urbo de nia pasintjara Kongreso, bezonas ankoraŭ vian helpon por sia brila k plena esperantistiĝo. — La Grupo Laborista Esperantista preparas, por mezo de julio, okaze de la kvara datreveno de sia fondiĝo, imponan ekspozicion de esperanta materialo k solenan letervesperon.

Ĝis tiam, bombardu nin daŭre per afiŝoj k propagandiloj, per poŝtkartoj k kuriozaĵoj ! per ĉio ajn ! Eksaj gekongresintoj : sendu salutojn ! se vi ankoraŭ ne forgesis la feliĉajn tagojn de nia XIV-a, havigu al ni utilan materialon.

Ni havas sufiĉan kuraĝon por respondi al ĉiuj !

**Grupo Laborista Esperantista,** Horno del Hospital, 12, *Valencia* (Hispanio).